

DIA REGNO

DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 6 (873) • 2008 •

1908 – 2008

DIA REGNO
ISSN 0167-9554

kaj

... kaj



KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;

☎ +33 (0) 549468021;

✉ keli@chez.com

Sekretario: Pavel Polnický;

✉ Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio;

☎ +420 325 615 651;

✉ cea.polnicky@quick.cz

Kasisto: Siegfried KRÜGER

✉ Claudiusweg 10,
DE 74074 Heilbronn, Germanio;

☎ +49 7131 162688;

✉ siegfriedkrueger@arcor.de

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu preferi pagi al UEA por konto **kelp-p** de KELI • Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI: 5506132.

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Västergårdsg 15; 256 64 Helsingborg; Svedio;

☎ +46 (70) 2004574;

✉ dr_boarad@yahoo.se

Kontrollegis: Éva FARKAS -TATÁR

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.

Ekspedado: Pavel Polnický

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio

✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec

ENHAVO

alvenos Tiu, kiun ni forte atendis	123
Kiel limako kun surdorsa dometo	124
Kial eldoni revuon? Lecionoj el kristanaj esperanto-gazetoj	125
Tri Spasoj – Savantoj	130
Primuso Trubero – La homo por ĉiuj epokoj	131
80-jara legejo “Lui Brail” en Bulgario	136
Malsamaj opinioj	137
“Nia laboro ne estas vana en la Sinjoro”, parto 2	138
Raporto pri prepara vizito al Vroclavo, nia kongresurbo 2009	140
Bibliaj Tagoj, 2008 en klostro Nütschau, norda Germanio	141
La apostolo Paŭlo en Turkio	142
Informetoj	143
Mi volas	144

REDAKTORAJ VORTOJ

Pri tiu ĉi numero mi ŝatus diri “kaj ... kaj”. Pro tio la bildo sur la fronta paĝo. La unua artikolo en tiu ĉi numero memorigas nin pri la bonveniga hejmo, nia sekura loko kun varma etoso kaj ni nun preparas niajn hejmojn por la granda festo. La dua artikolo memorigas nin pri la situacio de multaj homoj, kiuj ne havas hejmon kaj varman etoson. Nia kredo defias nin – kion ni faras por “liaj etaj gefratoj”? Mi mem vere ne povas fieri, kaj ĉiutage mi, kelkfoje kun malbona konscienco, vidas kaj preterpasas homojn kiuj havas malfacilan vivsituation.

Tamen mi volas deziri al vi la plej bonan kristnaskan feston kaj bonan varman kaj familian etoson. Samtempe mi esperas ke vi ne forgesos niajn pli malbonsancajn gefratojn.

Belan Kristnaskon!



...alvenos Tiu, kiun ni forte atendis

Éva FARKAS-TATÁR, HU

Kaj li diris: Unu viro havis du filojn; kaj la pli juna diris al sia patro: Patro, donu al mi la heredotan parton de la havo. Kaj li dividis inter ili siajn vivrimedojn. Kaj post ne multaj tagoj la pli juna, kolektinte ĉion, forvojaĝis al malproksima lando; kaj tie li disperdis sian havon per diboĉa vivado. ...

Kaj li leviĝis, kaj iris al sia patro. Sed kiam li estis ankoraŭ malproksime, lia patro lin vidis kaj kortuŝiĝis, kaj kurinte, falis sur lian kolon kaj lin kisadis. ...

Sed la pli maljuna filo estis sur la kampo; ... [kaj] li diris al sia patro: Jen tiom da jaroj mi servas al vi, kaj neniam mi malobeis vian ordonon, tamen vi neniam donis al mi kapridon, por ke mi estu gaja kun miaj amikoj; sed kiam venis ĉi tiu via filo, kiu formanĝis vian havon kun malĉastistinoj, vi buĉis por li la grasigitan bovidon. Kaj li diris al li: Filo, vi estas ĉiam kun mi, kaj ĉio mia estas via. Sed konvenis esti gajaj kaj ĝoji; ĉar ĉi tiu via frato estis mortinta, kaj denove vivas; li estis perdita, kaj estas trovita. (Ĉerpoj el Luk 15, 11-32)

Baldaŭ ni ekbruligos la duan aŭ eĉ la trian kandelon sur la adventa krono. Ĝi simbolas, ke la Lumo proksimiĝas. Baldaŭ plenumiĝos nia espero kaj alvenos Tiu, kiun ni forte atendis.

La supra biblia vorto el la konata parabolo de Jesuo Kristo direktas niajn okulojn al tiu mirinda patro kiu atendis la filon. Tiun filon, kiu sendanke forlasis lin kaj diboĉante perdis sian hered-aĵon. Rigardu tiujn vortojn: “*kiam li estis ankoraŭ malproksime...*”. Eble aliaj eĉ ne estus rekonintaj la fremdulon, sed la patro tuj sciis kiu li estas. Kial? Ĉar ekde lia foriro li ĉiutage atendis reen sian filon.


Kiam ni atendas la alvenon de la festo, renkontaĵojn kun niaj geamatoj

ĉirkaŭ riĉa aŭ malriĉa, sed festa tablo, ni haltu kun humila kaj dankema koro antaŭ la Patro, kiu fidele atendas la perditan filon! Kaj kortuŝite ni pensu pri tio, ke Li tiel atendas ankaŭ la alian filon, kiu korpe restis hejme, sed anime tiel malproksimiĝis de la spirito de la Patro. Li ne plu ĝojas, ke li ĉiam povas esti ĉe la Patro kaj ĉion li havas kion Li. – Ho kiel atendas la Patro ankaŭ tiun “perditan” filon!

Ĉu la Patro vane atendas? Ĉu ni retrovos la patran domon – aŭ ĉu ni retrovos tiun “unuan amon” kiun ni sentis, kiam ni unue trapaŝis ĝian sojlon?

– Donu al ni, nia ĉiela Patro, feliĉan renkontiĝon kun Vi mem kaj ankaŭ kun niaj gefratoj!





Kiel limako kun surdorsa dometo...

Jacques TUINDER, NL

Pro tio, ke dum miaj misiaj vojaĝoj mi ofte renkontas sentegmentulojn, mi kompreneble de tempo al tempo meditas pri la giganta problemo de miloj da viroj kaj virinoj, junuloj kaj infanoj, tage kaj nokte sub nuda aero vivantaj sen “lukso” de loĝejo. Temas pri homoj, kiuj moviĝas kiel limakoj surdorse portantaj sian propran dometon. Ili similas al pilgrimantoj, kies tuta posedaĵo kuŝas sur la ŝultroj. Dorsosakoj plenaj de materialoj por dormi, kuiri, sin vesti, manĝi kaj trinki, por ke ili vivu hodiaŭ kaj vivu ankaŭ morgaŭ. Kelkaj estas tiom riĉaj aŭ inventemaj ke sian tutan trezoraron ili movas antaŭen sur ĉareto aŭ biciklo.

Nu, tre povas esti ke foje ili pro sia stranga konduto kaj alinormala vivmaniero fortimigas preterpasantojn. Sed aliffoje la mondeto de la sentegmentuloj ŝajnas iom komparebla kun tiu de la “pli bonstataj civitanoj” en la socio. Ankaŭ surstratuloj konas klasojn kaj malegalecojn. Tiel troviĝas inter ili “riĉuloj” kiuj ekzemple kapablas ludi muzikilon kaj per tio pli facile povas perlabori sian panon. Ili sukcesas tiel iom pli komforte organizi sian vagantan ekzistadon. Kaj aliflanke, certe, sentegmentas “plejmalriĉuloj” kiuj havas nur unu talenton: almozetado.

Kaj kiel ĉie en la socio, ankaŭ inter homoj kiuj limake vivas troviĝas “bonuloj” kaj “malbonuloj”. Kiom ajn mizeraj kaj kompatindaj ili ĉiuj estas, tamen regas inter ili ĵaluzo, envio, ĉar la plej minimuma posedaĵo en ilia rondo validas kiel formo

de riĉeco! En la tribunalaj dosieroj, sekve, renkontiĝas la plej sangaj bataloj, eĉ mortigaj, inter sentegmentuloj. Kaj la kaŭzo preskaŭ ĉiam reduktiĝas al ĵaluzo pro tio ke unu kiu ne bezonas peti monon posedas pli ol la kolego.

Al mi plaĉas la starigo de ejoj – kiel tio okazas en Svedio – kie ili en ŝranketo, for de la okuloj de samsortanoj, povas forŝlosi siajn plejvaloraĵojn. Ideala estas la situacio, kiam en tiuj ejoj social-helpistoj havas siajn horojn por konsultado. Ilia ĉeesto rezultigas nelaste senton de sekureco.

En Nederlando, kie la policistoj ne malofte ludas helpan, korektan aŭ peran rolon, tio bedaŭrinde ankoraŭ ne realiĝis. En miaj okuloj policista interveno ne estas la plej bona maniero por interproksimigi la organizitan socion kaj la mondon de la sentegmentuloj.

Ĉu ne povas esti, ke ankaŭ tiu civilizita socio kelkfoje “kunkulpas”, elsputante siajn membrojn, precipe kiam temas pri akumuliĝo de ŝuldoj? En mia lando surstrate vivantaj homoj spertas multe da varmaj kaj varmigaj servoj flanke de ĉaritataj kaj ekleziaj organizaĵoj, inter kiuj pintas la nobla kaj nelacigebla Savarmeo!

Kiam mi antaŭ nelonge rolis kiel dupieda – “prunteprenebla” – libro en nia biblioteko, apartenis al nia grupeto kvinpersona ankaŭ Kornelio, kiu ne havas tegmenton super la kapo kaj pasigas siajn tagojn vendante specialan stratĵurnalon. Ĉu estas miraklo, ke pluraj homoj, vizitintaj la bibliotekon, deziris legi ĝuste en la vivolibro de Kornelio? ☞



Kial eldoni revuon? Lecionoj el kristanaj esperanto-gazetoj

Dumkongresa prelego de Philippe COUSSON, FR

Ci-jare oni jubileas la cent jarojn de Dia Regno. Mi estis petita prepari iun enkondukon, iun historian skizon. Fakte tiu skizo jam ekzistas, kaj ĝin verkis Adolf Burkhardt. Mi do ne ripetos ĝin, mi uzos ĝin. Mi ne volis simple redoni historion, datojn kun faktoj. Mi volis aldoni demandon, problemon. Jen ĝi: kial oni eldonas revuon, kaj pli specife kristanan revuon, esperantan kristanan revuon.

Tamen, en mia unua parto, mi trairos la historion de Dia Regno per grandaj trajtoj, ankaŭ la historion de kelkaj aliaj Esperantaj kristanaj revuoj. Kaj poste mi revizitos tiun ĉi historion, analizante la diversajn motivojn por eldonado de revuo.

En tiu tempo ankoraŭ ne ekzistis KELI, kaj ankaŭ neniuj kristana protestanta ligo esperantista. Ankaŭ ne ekzistis kantlibro, ankaŭ ne ekzistis kompleta Biblio en Esperanto.

Ĉekomence mi devas mencii ke Dia Regno ne estas la unua revuo kristana aperinta en la lingvo de D-ro Zamenhof. Jam en oktobro 1903 aperis la unua numero de Espero Katolika, en la franca urbo Tours. Oni povas vidi ĝian faksimilon sur la reto.

En marto 1908 aperis efemera revuo per nur unu numero: “Biblia Tradukisto”, la unua faka revuo en Esperanto. La kialo de la ĉeso estis la transiro al ido de unu

el la ĉefaj gvidantoj de la revuo.

Kvin jarojn post la katolikoj, la germana protestanto Paul Hübner, inĝeniero en Mülheim am Rhein eldonis sian informilon, en aprilo 1908. La kompleta titolo estis: “Esperanto en la servo de la Dia Regno. Monataj raportoj pri la disvastigo de Esperanto inter la Kristanaj Unuiĝoj de Junaj Viroj”. La eldonado komenciĝis kun kvin abonantoj, kaj fine de la sama jaro jam estis 80 abonantoj.

Kvankam li rapide volis modifi la titolon al pli simpla “Kristana Esperantisto”, aperis ĉe la nova jaro la titolo “Dia Regno”, kiel mallongigo de la unua titolo, iom enigma al la novulo, sed kiel programo de agado por kristano.

En tiu tempo ankoraŭ ne ekzistis KELI, kaj ankaŭ neniuj kristana protestanta ligo esperantista. Ankaŭ ne ekzistis kantlibro, ankaŭ ne ekzistis kompleta Biblio en Esperanto.

Kiel diris la unua titolo, Hübner celis unue enkonduki Esperanton en la kadron de la Kristanaj Asocioj de Junaj Viroj (KAJV – angle YMCA). Tio poste montriĝis neebla, parte ĝuste ĉar tiaj iloj kiel kompleta Biblio ne ekzistis jam.

En la revuo tamen oni sentas jam la preparon de tio, kio okazis en la UK de Antverpeno, 1911, nome la fondiĝo de KEL, la estonta KELI.

Dum la jaro 1912 aperis suplemento “La stelo de l’ feliĉo, literatura aldonon”.

Kiam la esperoj de Hübner komencis efektiviĝi, funkcia ligo, pozitiva re-

spondo ĉe KAJV, tiam ekestis la unua monda milito. Fino, provizora.

Post la milito, ni rigardu al alia lando,



Paul Hübner.
Foto el DR 1951

ne plu Germanio, sed Finnlando. Tie kristanaj esperantistoj, el kiuj la pastoro Pātiälä eldonis gazeton kristanan en Esperanto kaj ankaŭ en la finna, “Kristana Espero” (KE), kiu aperis de 1920 ĝis 1925. En 1921, ĝi fariĝis “provizora

organo” de KEL, kaj rubriko en ĝi estis “Dia Regno” (DR), denove redaktita de Hübner.

Post iu ne klara kialo, DR ne plu aperis en KE kaj aperis mem en 1923. Samjare aperis nomoj en la redaktora stabo: la brito Luyken kaj la norvego Bonnevie. Pro la ekonomia situacio en Germanio, la eldonado ĉesis en 1924. Dum tiu “paŭzo” en la eldonado de DR, Hübner devis tamen de tempo al tempo eldoni “Informilon”, kiun Adolf Burkhardt neniam vidis.

Oni devas ankaŭ noti, ke en Anglio de 1917 ĝis 1922 aperis “Eklezia Revuo”, kiel organo de Eklezia Esperanto-Ligo. Krome, mi ne trovis informojn pri la revuo “Kvakera Esperantisto”, de la Kvakera Esperanto Societo, kiu estis fondita en 1921.

Alia revuo kristana aperis en tiu periodo en Britio, nome “Kristana revuo” de 1927 ĝis 1939. Eldonis ĝin f-ino Harriet Hanbury, kiu mem preskaŭ ĉion faris. Ŝi eĉ devis translokiĝi pro la bruo de la presmaŝino. Fakte, tiu revuo estis multe pli kristana revuo en Esperanto ol esper-

antista kristana revuo. Kontraŭe al la principo ofta en la Esperanto-gazetoj, ĝi ĉefe enhavis tradukaĵojn. Tamen ĝi informis ankaŭ pri la diversaj kristanaj organizaĵoj esperantistaj tiutempaj. De Hoog en Nia Historio citas sep tiaj asociojn.

En Nederlando, en 1932 okazis kuniĝo de diversaj grupoj kaj ekesto de nova sekcio de KELI, kiu nomiĝis KUNE (Kristana Unuiĝo de Nederlandaj Esperantistoj), kiu eldonis sian propran revuon: “Kristana Gazeto” (KG), kiu aperis ĝis 1941. Kiel okazis kun la finna Kristana Espero, DR ricevis spacon, kvar paĝojn, en KG ekde julio 1932. La kvalito de KG estis tre bona laŭ la prijuĝo de Adolf Burkhardt.

Dum la milito, la vivo de KELI transiris al Svedio, kie aperis “provizoraj” numeroj de Dia Regno, de 1941 ĝis 1946. KELI kaj Dia Regno pretervivis dank’ al tiuj homoj, Gunnar Furhammar, Ivar Karlsson, Erik Carlén, Anna Henriksson (poste Alamo, poste Alamo-Sandgren)

En postmilita jaro 1947, Dia Regno denove “normale” aperas en taŭga formato, redaktita ankoraŭ de Karlsson. En Bern, li sukcesis transdoni la redaktorecon al Van Spronsen. Sub lia gvidado, la revuo migris al Nederlando ankaŭ en la farado antaŭ ol reveni al Svedio por dukapa redakta teamo, van Spronsen kaj Karl-Olof Sandgren. Alia duopo, nederlanda-sveda, en 1952 transprenis la redaktadon, Carlén kaj Brakké, kaj rapide Brakké sole kaj kompetente ĝis 1961. La presado tiam por longa periodo venis al Nederlando, de 1955 ĝis 1987, ĉe Tuijtel.

En 1959, de Hoog listigas la aperantajn gazetojn en la rondo de KELI – ili estis naŭ: *Medlemsblad* en Svedio, *Esperanto-*

Oikumene en Germanio, *KUNE-bulteno* en Nederlando, *Kristana Alvoko* en Britio, *Kristana Bulteno* en Usono, *Kristana Voĉo* en Norvegio, *Kristana Bulteno* en Svislando, *La Ponteto* en Francio kaj *Cirkular* en Danlando.

En 1961 okazis ŝanĝiĝo de redaktoro.

La plej longa redaktora periodo komenciĝis. Jan van Keulen estis redaktoro de Dia Regno de 1961 ĝis sia morto en 1989. Li zorgeme redaktis la revuon, vivigis ĝin, organizis redaktoran stabon ĉirkaŭ si, la tiel nomatan “kolektivon Vlaardingen”, kiu estis ofte citita kiel tradukisto.

La temoj pritraktitaj en la revuo estis tre variaj, kristanaj kaj esperantaj, sed la plej grava temaro estis la KELI-kongresoj: prezento de la kongreslando, de la temo, raportoj, tekstoj. Ĉar de 1947 okazis preskaŭ ĉiujare KELI-kongreso.

Kaj tiuj kongresoj, de post la jaro 1968 estas de tempo al tempo ekumenaj kun IKUE. Kaj estis ankaŭ kaŭzo de specialaj numeroj, komunaj de Dia Regno kaj Espero Katolika. Nur kelkaj tiuj numeroj aperis, ĝis 1974. Poste ne plu, pro ne matureco de ekumenismo. Ĉu konsekvence, la kromtitolo de Dia Regno fariĝis ekde 1975 *Kristana Esperanto-Gazeto*?

En 1964 fondiĝis revuo, laŭ mi grava por la kristana esperantismo, “*Biblia Revuo*”, kiu daŭris ĝis 1984. Fakte, indekso aperis en 1985. Ĝi estis faka revuo, kiu troviĝas en sufiĉe multaj universitataj bibliotekoj, kaj estas citita en bibliografioj.

De 1985 ĝis 2000, la malaperinta revuo *Biblia Revuo* estis anstataŭita de “*Ekumenismo*”.

En 1987 mi lanĉis mem revuon “*Evangeliaj Kajeroj*”, kiu vivis dum dek

jaroj kaj dek numeroj. Temis pri teologia revuo, do ne movada, iamaniere provo por pleniĝi la spacon liberigitan de *Biblia Revuo*.

En 1988 komenciĝis por Dia Regno la periodo de nova presisto, Grafika Centro Antverpeno, Belgio. Do esperantista entrepreno. Tiu jaro estis ankaŭ jaro de ŝanĝiĝo en la numerado de la paĝoj kaj de la numeroj.

En 1989, post la morto de Jan van Keulen, oni devis trovi alian redaktoron. La julia numero estis preta jam, la aŭgustan pretigis Leen Hordijk, kaj ekde la septembra numero mi ekfunkciis kiel redaktoro. Ne tute nova tasko. La redaktadon de DR mi kondukis dum malpli longa periodo ol Jan van Keulen, kiu tion faris dum preskaŭ 28 jaroj. Mi faris tion nur dum 15 jaroj, ĝis 2004.

En tiu periodo okazis du aliaj modifoj, de aperritmo kaj de presisto. De presisto: en septembro 1997, ni transiris al Pollando, kie Kazimierz Leja presis nian revuon. De aperritmo: en 2000, la nombro de numeroj ŝanĝiĝis al po 6 jare, kun modifo de la formato al A5. Tio ĝis nun en 2008 validas.

Kiam en 2005 mi fariĝis prezidanto de KELI, mi devis lasi ankaŭ la redaktadon. Ĝin transprenis la nuna redaktoro, Bengt Olof Åradsson, el Svedio. Samtempe, ni ankaŭ transiris al nova presisto, en Ĉeĥio, Astroprint en Poděbrady, sub kontrolo de Pavel Polnický. Kaj jen, la revuo, kiun vi ricevas hejme, kaj legas.

Post tiu tre rapida retrorigardo al la historio de nia revuo kaj de la aliaj kristanaj revuoj en Esperanto, mi volas veni al mia demando – kial eldoni revuon?

Mi trarigardos la diversajn argumen-

tojn donitajn de la eldonistoj, provos klasifiki ilin, kaj proponos al vi pripensi nian revuon kaj ĝian estontecon.

Oni ne ĉiam trovas la indikon, sed ĝenerale eldonado de revuo okazas post diagnozo, konstato de situacio, de manko, kaj ankaŭ supozo aŭ kono de ekzistanta publiko. En tiu kadro, mi volas citi tri konstatojn, kiuj kondukis al eldono de revuo.

Vikipedio konstatas ke Hübner devis verki multobligitajn leterojn, kaj ke tio kondukis lin al la revuo kiu fariĝis DR. En la redaktora artikolo de la lasta numero de Biblia Revuo (BR), la aŭtoro citas la unuan numeron, kiu diras i.a. ke unu el la celoj estas “ripari la ĉagrenan ĥaosan situacion en bibliaj kaj orientaj gazetoj, kie unusama numero ofte enhavas artikolojn en lingvoj angla, germana, franca, rusa, itala, latina, hispana, kc.”

Post la malapero de ĝuste Biblia Revuo, la redaktora artikolo de la unua numero de Evangeliaj Kajeroj indikas, ke la celo de la revuo estas “pleniĝi vakuon, siaskale”.

La unua konstato estis jam *ekzistantaj kontaktoj*, ne tiel formalaj, sed sufiĉe oftaj por pravigi eldonon de revuo. La du ceteraj fontas el *konstato de situacio* kiu aperas ne bona.

De la jaro 1964 ĝis nun, mi pensas ke la nombro de artikoloj pligrandiĝis en la angla lingvo, sed tion mi ne kontrolis, tamen BR sukcesis trovi sian lokon en la faka mondo, kaj ĝia postulo ke “bone instruita persono tute facile kaj senerare povas kompreni internacian lingvon, tute sen peniga studo” iamaniere validiĝis. Tio daŭris 20 jarojn.

La “manko” de faka revuo post la malapero de BR eble estis vera, sed la sukceso ne troviĝis antaŭ Evangeliaj Kajeroj, kiu

daŭris nur 10 jarojn kaj 10 numerojn.

Tamen, tiu mencio pri iu studo de la situacio kaj de la efektiva utilo de la eldonado ne aperas en plej multaj. Aperas pli ofte nur mencioj pri la kialoj, la motivoj, la celoj de la eldonado.

La plej ofte menciita motivo estas *informi*. Informi povas respondi al pluraj bezonoj, supozataj aŭ veraj, bezonoj de la leganto aŭ bezonoj de la komunikanto. Por DR, la indiko troviĝas jam en la subtitolo de la unua numero: “Monataj raportoj pri la disvastigo de Esperanto inter la Kristanaj Unuiĝoj de Junaj Viroj”. Poste aldoniĝis “kaj la tuta vera kristanaro”.

La unua redaktoro volis do informi pri la disvastigo en kristanaj medioj, ĉefe ĉe KAJV. Longe daŭros lia provo tiudirekten, kun preskaŭ sukceso, kaj fine malsukceso. Post 1947, la informoj pri la kongresoj de KELI kaj la kongresaj landoj estis tiom ampleksaj, ke pluraj plendis ke la gazeto transformiĝis en turisman bultenon.

“Kiel fina celo de la naskiĝinta DR”, de Hoog citas “devas esti gvidisto al Jesuo Kristo kiel nia sola Savinto, de Kiu ĉiuj homoj trovas la veran feliĉon eterne daŭran.”

Komenciĝinte en 1991, la germanlingva Ökumenische Esperanto-Forum “informis pri tio, kio estas ekumene notinda pri Esperanto kaj la eklezio.”

Tute alian temon de informoj havis la Kristana Revuo en 1927: ĝi volis “disvastigi iom el la vasta provizo de sciigoj pri la laboro de veraj Kristanoj tra la tuta mondo”. Eĉ estis aldonite: “Ni ne celas propagandi Esperanton, nek Esperantajn entreprenojn.”

Nuancon alportas la finna revuo Kristana Espero: “La tasko de la revuo estas interesigi kristanojn pri Esperanto kaj esperantistojn pri kristana religio.” Ĉi tie, oni ne plu simple kalkulas kun la emo informiĝi, oni volas provoki la emon informiĝi, oni volas interesigi.

Fakte, rekte aŭ nerekte, la celo de la revuoj estis varbado, aŭ almenaŭ monstro de ebla utilo de Esperanto en kristanaj medioj.

De Hoog indikas en sia unua ĉapitro: La tasko de ĉi tiu gazeto estas: montri la grandan utilon de nia lingvo por la rilatoj inter la kristanoj de la tuta mondo. Ĝi devas esti la informilo komuna pri la kristana vivo en ĉiuj partoj de la tero; ĝi devas esti ligilo inter ĉiuj kristanaj samideanoj, por ke ili staradu ĉe ilia posteno, kiam montriĝas okazo helpi per Esperanto al iu ajn kristana afero.

La tria celo de Biblia Revuo estis: konvinki ke Esperanto povas penetri la fakan mondon, malgraŭ la ĝisnuna tendenco daŭre ĝin uzi nur por priesperantaj aferoj aŭ por populara literaturo. Kaj fakte ĝia ekzisto pruvis ke Esperanto povas funkcii ankaŭ kiel faka lingvo.

Varbado por kristanismo kiel motivo de la revuoj malofte aperas. Plene sekvis tiun ideon la serioj (ne vere revuo) de KO Sandgren kaj Esperanto-Misio, nomitaj “Greneroj por la animo” kaj “Evangelia serio”. Kristana Espero indikis ankaŭ: “Ĝi (la revuo) volas servi la eternan regnon de nia Dio en internacia lingvo.” Kiel fina celo de la naskiĝinta DR, de Hoog citas “devas esti gvidisto al Jesuo Kristo kiel nia sola Savinto, de Kiu ĉiuj homoj trovas la veran feliĉon eterne daŭran.”

Tiu celo, malofte notita en la revuoj

mem, troviĝas pli ofte en la celoj de la ligoj, al kiuj preskaŭ ĉiam revuo estas ligita. Mi citas el la statuto de KELI: punkto ĉ en la celoj: “uzi Esperanton por disvastigi la Evangelion de Jesuo Kristo.” Sur la insigno, kiu estis proponita en 1931 troviĝis la jena slogano: “La Evangelio per Esperanto”.

Kompreneble, tiu celo ankaŭ retroviĝas en la revuo, tamen tre leĝere, ĉar la publiko, la legantaro estas plej ofte kristanoj.

Tamen, ekzistis ankaŭ revuoj, kies celo estis unue nur uzi la lingvon: por informi, por prezenti fakajn tekstojn. Ekz. en la unua paĝo de Evangeliaj Kajeroj: “Ili (la aŭtoroj) volas lasi al vi siajn studojn, siajn pensojn, siajn travivaĵojn, siajn konvinkojn.”

Tamen, eĉ senkonscie, tiu celo kunportas alian: pruvi ke ĝuste tiu uzo de Esperanto funkcias, ke Esperanto validas. Multaj aplikis, kion diris Biblia Revuo, ke Esperanto povas funkcii ankaŭ ekster la Esperantismo.

La teknika kaj redakta kvalito multe variis, laŭ kapablo kaj kompetenco de la prizorgantoj. Adolf Burkhardt citas kiel ekzemplon la periodon kiam Espero Katolika estis redaktita de Stefan Maul, profesia ĵurnalisto.

Sed, tiu feliĉo foje havis finon, aŭ interrompojn. La kaŭzo plej ofte estis la sama – financoj. Tro ofte la revuoj, eĉ kiam ligaj, vivis pro unu aŭ du personoj. Kiam la kostoj superis la kapablojn, la revuoj ĉesis aperi. Kompreneble, estis ankaŭ la militoj. Estis ankaŭ la okupiteco de homoj, aŭ la aĝo aŭ morto. Tamen, sekuraj monrimedoj estas grava punkto por daŭra revuo, ankaŭ por kristana revuo en Esperanto.

Post tiu promenado en la tempoj, en la historio de la kristanaj revuoj kaj de nia Dia Regno, mi volas lasi al vi pripensi la estontecon:

Kiun revuon vi volas? Por kiu celo? Per kiu rimedo? Ni uzu tiun jubileon por iom certigi la estontecon. Kion ni volas, kaj en tio, kio estos la rolo de nia revuo?

Ĉar fakte, nun, KELI vivas ĉefe per siaj kongreso kaj revuo. Ili ambaŭ estas vivisignoj. ☞

Fontoj:

Nia Historio, H. de Hoog, KELI, 1964.

Dia Regno: historio de Kristana Esperanto-revuo, A. Burkhardt, en Menade bal pŭki bal, festlibro por Reinhard Hauthenthal, Iltis, (depreso).

Biblia Revuo, indekso 1964-1984, 1985.

Evangeliaj Kajeroj, 1, 1987

Kristana Revuo, 1, 1, 1927.

Historio de Finna sekcio de KELI, O.

Kantele, Espoon Pika-Jäljennös, 1994.
www.ikue.org



La rusa Ortodoksia (Pravoslava) Eklezio celebras tri festojn en laŭgusto kiuj nomiĝas tri “Spasoj”. La Spaso en la rusa lingvo signifas “Savanto”. La festoj estas dediĉitaj al la rikolto en la fino de la somero, kiun donas al ni nia Sinjoro Jesuo Kristo, ĉar ĉio kaj, certe, bona rikolto dependas de Dio.

La unua Spaso okazas la 14an de aŭgusto kaj nomiĝas miela Spaso, ĉar dum la tago laŭ la rusa tradicio en ĉiuj pravoslavaj preĝejoj oni sanktigas mielon de la nova rikolto.

La duan Spason, la poman, oni celebras la 19an de aŭgusto samtempe dum la festo de la Transfigurigo de nia Sinjoro Jesuo Kristo. Laŭ Eklezia Statuto dum la tago oni devas sanktigi vinberojn, sed en la norda Rusio ne kreskas vinberoj kaj oni kutime sanktigas pomojn kaj nomas la tagon poma Spaso.

La tria Spaso estas nuksa. Ĝi estas


Tri Spasoj – Savantoj

Larisa KUZMENKO, RU

celebrata la 29an de aŭgusto, kiam la kristanoj rememoras la senmane faritan bildon de nia Savanto. La festo estas ligita kun la evento kiam unu homo deziris fari portreton de nia Sinjoro, sed pro multaj homoj, kiuj ĉirkaŭis Jesuon, li ne povis proksimiĝi al Li. La Sinjoro sciis pri la deziro kaj viŝis sian vizaĝon per tuko sur kiu respoguliĝis Lia vizaĝo. Ĉi tiu bildo-ikono estas fama pro multaj mirakloj.

Du Spasojn (la 14an de aŭgusto kaj la 19an de aŭgusto) oni celebras dum la Asumpcia fasto.

La 28a de aŭgusto estas la festo de Asumpcio – la ĉielenpreno de nia Plej-sankta Sinjorino Diino Maria. Dum la festo la pravoslavaj homoj havas manĝaĵojn kun oleo nur sabate aŭ dimanĉe. Dum la Asumpcia fasto oni povas manĝi fiŝon kaj oleon ankaŭ la 19an de aŭgusto dum la festo de la Transfigurigo de nia Savanto. ☞



Primuso Trubero

La homo por ĉiuj epokoj

Preparis: Vinko OŠLAK, AT

- * 1508 en vilaĝo Rašica ĉe Velike Laŝce, sude de Labako (Ljubljana)
- † 1586 en Derendingen en Germanujo

La tuta kulturmondo en la jaro 2008, okaze de la 500-a naskiĝdatreveno, aŭspice de UNESCO, rememoras la “patron” de la slovena unua libro kaj literaturo, de la slovena normlingvo kaj tiel ankaŭ de la slovena nacio kaj ĝia nuntempa ŝtata suvereneco. La kristanoj en Slovenio tamen rememoros Primuson Truberon antaŭ ĉio alia pro tio, kion tiu simpla, sed per tiomaj talentoj pridonita slovena misiisto de la vera evangelio faris por siaj samgentanoj kaj ankaŭ por multaj aliaj en la spirita kaj poreterna dimensio.

Estas vere, ke sen Trubero tre verŝajne ne troviĝus la sendependa kaj en multaj aspektoj floranta slovena ŝtato – sed tio ne estus la plej granda malfeliĉo por la homoj, naskiĝintaj kaj vivintaj en tiu ĉi regiono. Estas vere, ke sen Trubero tre verŝajne ne troviĝus komuna slovena literatura normlingvo kaj en ĝi estiĝinta riĉa literaturo – sed ankaŭ tio ne estus la plej granda malfeliĉo por la loĝantoj de la regiono inter Alpoj kaj Adrio. Sed estus malfeliĉo senkompara, se slovenoj kaj aliaj ne aŭdus pri la evangelio de Jesuo Kristo kaj liaj apostoloj, kiu estas la nura gvidlibro por eniri la eternan ĉielan regnon, kiu estas la lasta senco de la homa vivo. La eldiron de Jesuo: “*Ĉar*



kiel profitus homo, se li gajnus la tutan mondon kaj perdus sian animon?” (Mar 8,36) oni povus ankaŭ turni al la cirkonstancoj en Slovenio: Kiel profitus sloveno, se li prikonscias sian nacian apartenon, formas sian komunan literaturan normlingvon kaj produktas en ĝi riĉan literaturon; se li fondas propran ŝtaton kaj ĝuas inter la aliaj, ankaŭ pli grandaj nacioj bonan renomon de entreprenema kaj sukcesohava popolo en mirinda natura medio – sed li mem kaj liaj samgentanoj forgesus pri sia vera vivocelo, kiu troviĝas en la eterno ĉe Dio, kaj li kun

siaj samgentanoj malgajnus sian eternan vivon en saviteco?

Estas bele esti civitano de Slovenio, tamen ankaŭ tiu ĉi civitaneco estas io limigita kaj portempa, verdire efemera. La celo de ĉiuj homoj sur la tero, ankaŭ de slovenoj, estas je tuta eterneco pli alta: fariĝi la civitano de la Dia regno. La procedon, bezonatan por ke la homo akiru la rajton eniri la Dian regnon kaj fariĝi ĝia plenrajta civitano poreterne, al slovenoj montris Primuso Trubero, kiam li kiel la unua tradukis la kvar evangeliojn en la slovenan lingvon kaj tiel inter la simpla slovena homo kaj lia Dio ne troviĝas plu iu alia peranto krom Jesuo Kristo, kiel instruas la Biblio: “*Ĉar ekzistas unu Dio, kaj unu interulo inter Dio kaj homoj, homo, Kristo Jesuo*“ (1 Tim 2,5). Tiamaniere Dio, per la merito de Trubero, ekparolis ankaŭ en la slovena lingvo, por ke neniu sloveno havu ekskuzon.

La grandeco de Trubero estas rezulto de lia persona ŝanĝiĝo. Nur tial, ke li persone renkontis la Sanktan Skribon kaj Jesuon Kriston, li povis tiel profunde influi la historion de slovenoj.

Trubero havas sian grandecon ankaŭ en eŭropa kaj tutmonda komparo. Li havas grandecon en ĉio, kion li faris por sia gento kaj por aliaj gentoj kaj nacioj, al kiuj li predikis en ilia lingvo (itale, germane) kaj presigis por ili librojn en ilia lingvo (kroata, serba) kaj skribo (latina, kirila, glagola). Sed en Trubero manifestiĝas ankaŭ la grandeco de Dio, kiu senmezure superas ĉian homan gran-

decon kaj povon. Kiel diras mem la Skribo: “*Dio, kiu multfoje kaj multamaniere parolis en la tempo antikva al niaj patroj en la profetoj...*“ (Heb 1,1). Li tiel parolis ankaŭ serve de Trubero, kiu estis la unuaranga en tiu servado.

La slovena nacio niatempe okupiĝas, analoge kiel en la tempo de Trubero kaj de turkaj invadoj en lia epoko, pri modernaj formoj de la invado. Malrespekto de la ŝtato kaj de ĝia jura ordo, krudeco kaj senhonto en interpersonaj rilatoj, malobeemo de la infanoj al siaj gepatroj, instruistoj kaj estroj, eldevigado de supozaj rajtoj propramane kaj arbitre preter la ŝtata jura sistemo, kresko de la dependeco de alkoholo kaj narkotoj, terura statistika bildo pri mortigado de ne jam naskiĝintaj homaj estaĵoj kaj pri suicidoj, disfalado de la familioj kaj interpretado de la divorco kiel normala evento en la homa vivo, kresko de krimaj agoj kaj delikventaĵoj, de violento kaj perversaĵoj, jen nur kelkaj ekzemploj de persona kaj socia dekadenco. Tiel la ŝtato kiel ankaŭ la unuopulo ŝajnas esti tute senhelpaj antaŭ tiaspecaj “invadoj”.

La grandeco de Trubero estas rezulto de lia persona ŝanĝiĝo. Nur tial, ke li persone renkontis la Sanktan Skribon kaj Jesuon Kriston, li povis tiel profunde influi la historion de slovenoj. Trubero unue ekkonis, ke li pekis kontraŭ Dio, kiel diras la Skribo: “*Ĉar ĉiuj pekis kaj maltrafis la gloron de Dio*“ (Rom 3,23). Li same ekkonis, ke Dio estas justa kaj sekve devas puni la pekulon. Nur maljusta juĝisto preterrigardus la pekon. Sed Dio estas absolute justa kaj tiel Li ankaŭ ĉiun juĝos kaj tial “*nun Li proklamas al ĉiuj homoj, ke ili pentu, tial Li difinis*

tagon, en kiu Li juĝos la mondon en justeco“ (Ago 17,30b-31a). La salajro por la peko estas la eterna disigo de la Dio kaj eterna sufero: “*Ĉar la salajro de peko estas morto*“ (Rom 6,23). Sankta skribo same diras: “*Ĉar per la faroj de la leĝo neniuj karno praviĝos antaŭ Li*“ (Rom 3,20a). Tio diras, ke neniuj homo sin povas deaĉeti pro sia peko per bonaj agoj, mondonacoj aŭ aliaj propraj klopodoj kaj oferoj. Tiel la homo kiel pekulo estas en la manoj de la justa Dio, sen espero ricevi amnestion.

Tamen. Dio amas la homon kaj ne volas, ke tiu poreterne suferu. Kiamaniere do Dio kontentigu sian justecon kaj sian amon samtempe? La sola solvo, kiun Dio trovis, estas, ke Li sendis sian solenaskitan Filon. Jesuo per sia morto surkruce pagis pro la peko de ĉiu unuopulo, kiu estas preta repaciĝi kun Dio: “*Dio estis en Kristo, repacigante la mondon al Si*“ (2 Kor 5,19). La Sankta Skribo denove diras: “*Ĉar Dio tiel amis la mondon, ke Li donis Sian solenaskitan Filon, por ke ĉiu, kiu fidas al li, ne pereu, sed havu eternan vivon*“ (Joh 3,16). Jen tio estas la donaco, kiun neniuj povas pagi. Oni povas ĝin nur akcepti aŭ malakcepti. Trubero la donacon akceptis kaj per tio multon ŝanĝis en sia medio.

Tiel same ankaŭ Trubero per sia vivo kaj laboro parolis al slovenoj, kiel apostolo Paŭlo antaŭ jarcentoj: “*Ni vin petegas pro Kristo, repaciĝu al Dio*“ (2 Kor 5,20). Brita verkisto Roberto Bolt verkis radiofonian teatraĵon *A Man for All Seasons* (La homo por ĉiuj epokoj) pri la angla kanceliero, juristo, filozofo kaj verkisto Tomaso Moro, kiun la reĝo Henriko VIII-a enkarcerigis kaj igis lin

senkapigi, ĉar tiu kontraŭstaris la senbridan vivon de la reĝo. La teatraĵo atingis en la jaro 1960 grandan sukceson sur la teatra scenejo, kaj en la jaro 1966 la reĝisoro Zinnemann laŭ tiu teatraĵo produktis tre sukcesan filmon. Sed ankaŭ slovenoj havas la homon por ĉiuj epokoj, Primuson Truberon. Li ne estis senkapigita, tamen li estis elpelita el sia patrujo kaj ĝis niaj tagoj ne realiĝis justa kaj kompleta prijuĝo de lia vivo kaj verko.

Trubero ne estis senkapigita, tamen li estis elpelita el sia patrujo kaj ĝis niaj tagoj ne realiĝis justa kaj kompleta prijuĝo de lia vivo kaj verko.

Jen la stacioj de lia vivo

1508: 8-an de junio naskiĝis Primuso Trubero en Raŝica sude de Labako en la familio de Miĥaelo kaj Jera Trubero. La patro estis muelisto, ĉarpentisto kaj sakristiano.

1520: Trubero foriris al Rijeka/Fiume en malsupran sacerdotan seminarion.

1521: Trubero timis turkan minacon kaj translokiĝis al Salzburgo (Salzburg), kie li estis seminariano de la klaŭstra lernejo de s. Petro.

1524: Trubero venis al Triesto kaj fariĝis persona adjunkto de la episkopo Petro Bonomo. Li kantis en episkopa ĥoruso. Tie li renkontis kaj legis librojn de Vergilio, Kalvino kaj Erasmo de Roterdamo.

1530: La episkopo Bonomo konsekris Truberon al sacerdote. Trubero foriris

al Laŝko por funkcii tie kiel la vikario de la episkopo.

1542: Per la perado de la episkopo Bonomo Trubero fariĝis kanoniko (pli alt-nivela sacerdoto) en Labako. Li predikis jam en la spirito de reformacio.

1549: Trubero edziĝis al Barbara Sitar el slovena lando.

1550: Trubero eldonis la unuajn du slovenajn librojn: Katekismojn kaj ABC-libron (Abecedarium).

1557: Trubero komencis klopodi por kroata kaj serba (en kirila skribo) eldonado de evangelioj kaj katekismoj. En slovena lingvo li eldonis ĉiujn kvar evangeliojn en sia traduko kaj ampleksan Enkondukon.

1560: Trubero eldonis la duan parton de Nova Testamento. La landa aristokratio lin invitis fariĝi superintendente en Labako.

1561: Trubero fondis en Urach sian Biblian instituton, la unuan tiaspecan en centra Eŭropo. Post reveno al Labako li eldonis sian tradukon de la epistoloj de Paŭlo.

1562: Trubero eldonis en sia Biblia instituto la unuan parton de Nova Testamento en kroata lingvo kaj glagolita skribo. Konfliktoj kun kroataj kunlaborantoj. Post lia reveno al Labako kun sia familio, denuncio ĉe la episkopo Seebach kaj enketo ĉe li.

1564: La Biblia instituto en Urach komencis disfali. Aperis la “Konstitucio de slovena kristana eklezio” (Cerkvena ordnunga). Surbaze de tiu ĉi libro Trubero estis definitive elpelita el la lando, ĉar la landa dukotio komprenis kiel ŝtatfonda ago.

1567: Laŭ la sprono de la teologo Jakobo

Andreao, Trubero kaŝe vizitis Labakon kaj en la kastelo de Labako interparolis kun la turka militkaptito Usraim-beg pri islama religio kaj Korano.

1572: Georgo Dalmatin, juna disĉipulo de Trubero, laŭ lia sugesto komencis traduki la tutan Biblion en slovenan lingvon. Ĝi aperis en la jaro 1584.

1574: Post 7 jaroj da paŭzo Trubero denove komencis eldoni librojn. Aperis lia granda Katekismo, novel-dono de Psalmoj ktp.

1586: Trubero en sia mortolito finpigitis sian tradukon de Hauspostille de Lutero (lat. post-illa = poste, do: posttrakonto). Li mortis la 29-an de junio en Derendingen, kie li estas entombigita. Sur la preĝejo troviĝs german-slovena memortabulo pri Trubero.

1595: La filo de Primuso Trubero, Feliciano, eldonis la tradukon de la Dompostilo de Lutero en slovena lingvo.

La verkoj de Primuso Trubero

Primuso Trubero publicis dum sia vivo 22 librojn en la slovena lingvo, 2 en la germana kaj kelke da ili en kroata kaj serba lingvoj. Jen la tri eble plej gravaj el ili:

Katekizem, Abecednik (Katekismo kaj ABC-libro) en la jaro 1550. Tio estas la komenco de la evangelizado ĉe slovenoj en senco de libera instruado surbaze de la Biblio. Samtempe tio estis la komenco de slovena literatura normlingvo kaj literaturo. Ambaŭ libroj estis presitaj ankoraŭ en germana gotskribo, ĉar Trubero nur post tio definitive transiris al romstila latina skribo. Ambaŭ libroj aperis en germana urbo Tübingen. Tru-

bero subskribis siajn publikaĵojn pseŭdonime: Philopatridus Illyricus (Patrioto Ilira). La nura origina ekzemplero troviĝas en la Nacia biblioteko en Vieno.

Ta prvi dejl tiga noviga testamenta (La unua parto de la Nova testamento) en la jaro 1557; la 2-a kaj la 3-a partoj sekvis en la jaroj 1560 kaj 1577. Temas pri la unua traduko el la Biblio en la slovenan lingvon. En la jaro 1584 sekvis la kompleta slovena traduko de la Biblio de Georgo Dalmatin, disĉiplo de Trubero. La enhavo de tiu unua parto konsistas el 4 evangelioj kaj Agoj de apostoloj, komentario pri la eksplikoj de la kredo ĉe Lutero, la kalendaro kaj postilo (klarigo de potagaj kaj festtagaj evangeliaj legaĵoj).

Cerkovna ordninga (La eklezia ordo) en la jaro 1564. Per tiu libro Trubero provis starigi propran slovenan protestantan eklezion kaj en ĝi li interalie postulis ĝeneralan devigan elementan lernejon por ĉiuj infanoj. Ĉar la landduko Maksimiliano tion trovis enmiksiĝo en internajn aferojn sub lia aŭtoritato, li konfiskis la tutan eldonkvanton krom kelkaj ekzempleroj (la sola troviĝas en la papa biblioteko en Vatikano) kaj ordonis Truberon aresti, sed li ĝustatempe fuĝis en germanan landon. Laŭ sia karaktero tiu ĉi libro estas iaspeca prafarmo de slovena ŝtata konstitucio, ja en tiu tempo ordigi eklezion estis egale ol ordigi ŝtaton.

Li estis bona kantisto, jam kiel juna seminariisto li vivtenis sin en Salburgo (Salzburg) kaj en Triesto kiel eklezia ĥorkantisto. Tiel ne estas strange, ke li pioniris ankaŭ kiel aŭtoro kaj kompon-

isto de slovenaj kristanaj kantoj.

La resuma penso

Primuso Trubero antaŭ ĉio alia volis atingi ĉiujn slovenojn per Dia vorto kaj prediko pri ĝi. Kiel protestanto li komprenis, same kiel antaŭ li Lutero kaj aliaj reformistoj, ke la Dia vorto povas atingi homojn sukcese nur, se ĝi estas je dispono en la lingvo, kiun la homoj komprenas. Sekve li devis alpaŝi alfabetigon de slovenoj en ilia propra lingvo, ĝin tiel kultivi kaj doni al ĝi unuan koheran strukturon kaj formon. Serĉante la Dian regnon (Mat 6,33), al li kaj al lia popolo estis aldonita slovena norma literatura lingvo, nacia kulturo kaj en la jaro 1991 propra ŝtato. Se ĝi volas havi stabilon sub Dia beno, ĝiaj civitanoj devas reveni al la pura evangelio, kian predikis Primuso Trubero! ☩

Demandoj pri kristana kredo konforme al la Biblio kaj pri Trubero: oslak.vinko@gmx.at

Mi peras la esperantan tradukon kaj aranĝon de "Prediko pri la fido" el la jaro 1550 de slovena reformacia pioniro Primuso Trubero, kies 500-an naskiĝeventagon la slovena nacio ĉi-jare festas. La Prediko estas la lasta ĉapitro de la Katekismo, kiun Trubero eldonis kiel la unuan slovenan presitan libron. Tamen la teksto ne havas nur historian literaturan kaj lingvan valoron. Ĝi povas ankaŭ niatempe konduki homojn al Jesuo Kristo, kio estas la ĉefa celo kaj intenco de Trubero. Mi deziras ĝuste la saman evangelian efikon kaj salutas en nia Sinjoro –

Vinko Ošlak

P.S.: La enhavo aperis ankaŭ surpapere kaj estas senpage mendebla sub mia retadreso: oslak.vinko@gmx.at



80-jara legejo “Lui Brail” en Bulgario

Ivan ŜIŜKOV, BU

La legejoj en Bulgario estas pro-prakarakteraj formoj de libervolaj civitanaj societoj por patriotismo, popola kulturo kaj klereco. Iliaj komencoj havas siajn radikojn en la profundececo de la publika neceseco por batalo de la bulgara popolo por sia fizika kaj nacia saviĝo dum la kvin-jarcenta turka juko (XV:a – XVIII:a jarcentoj). Iliaj multformaj agadoj kontraŭ la strebo de la sklaviganto asimili la bulgaran popolon, donis eblecon por ĝia solidigado por la konservado de nia identeco kaj finfine elmiliti nian intelektan kaj politikan liberecon.

Konsidere al stimulado la kreadon kaj la socialan integriĝo de la homoj kun domaĝita vidkapablo en Bulgario, en 1928:a jaro, en ĉefurbo Sofio, oni fondis la nacian legejon “Lui Brail”. En daŭro jam de 80 jaroj ĝi estas amata informa, kultura kaj konsulta centro por ĉiuj homoj kun domaĝita vidkapablo en la lando.

La unua prezidanto de la legejo estis la fama bulgara komponisto Petko Stajnov. Li estis blindulo, kiu perdis sian vidkapablon post peza malsano jam kiel infano. Li sukcese gvidis la agadon de la legejo en daŭro de 18 jaroj.

La amikoj de la legejo ĉiam estis la plej famaj bulgaraj verkistoj, poetoj kaj multe da kulturaj agantoj.

Nun la legejo troviĝas en vasta apartamento en la centro de Sofio. Krom

granda biblioteko kun sciencaj kaj artaj libroj, ĝi estas ekipita kun la plej moderna aparataro por la eldono de teknikaj, sciencaj kaj artaj libroj je braila alfabeto. Tiu ĉi aparataro kaj granda kvanto de papero kaj aliaj konsumaj materialoj estas malavare donacitaj de la Internacia Esperanto-Fonduso *Evidente*, kies direktoro estas la fama nederlanda esperantisto kaj granda altruisto s-ro Jacques Tuinder.

Jam, en daŭro de 15 jaroj, la agado de la legejo oni gvidas kun granda kompetenteco de la altinteligenta, kun ĉiuspecaj interesoj, juristo s-ro Spas Karafezov. Perdinta sian vidkapablon kiel 18-jaraĝa junulo, pro travivado virusan meningiton kaj pro eraro en ĝia kuracado, li kun enviinda lerteco venkas la obstaklojn kaj li plene entuziasmigis sin en servo de la homoj kun domaĝita vidkapablo, al kiuj li deĉisis sin kun senprecedenca atento kaj amo.

La legejo estas la ununura eldonejo en Bulgario por teknika, scienca kaj arta braila literaturo en tri variantoj – braila, elektrona kaj aŭdia variantoj. La librojn oni sendas al ĉiuj bibliotekoj en la kluboj de la blinduloj en la lando, kie ili estas atingeblaj por ĉiuj membroj de la kluboj. Tiamaniere la legejo sukcese realigas sian noblan destinon zorgi por la klerigo kaj la integriĝo de la homoj kun domaĝita vidkapablo.





Malsamaj opinioj

MU Binghua, Ĉinio

Iu edukisto intencis fondi novtipan lernejon. Por tio li invitis plurajn amikojn al laborado kolekti monon. Sed post longa tempo ilia atingo estis tre limigita. Vole – nevole ili devas kunveni por diskuti pri tio, ĉu oni daŭrigu tiun ĉi laboradon aŭ forlasu ĝin.

Unu el la amikoj proponis: “Mi estas absolute aprobanta nian tiatipan lernejon. Sed, mi opinias, ke nuntempe la kondiĉo por starigi la lernejon ankoraŭ ne estas tute preta. Unue, oni malklare scias pri la signifo kaj la celo de nia kolektado de mono, ĉar ni nebone faris klarigon pri la konstruota lernejo. Due, oni esperas, ke la loka eduka fako elspezu monon por estigi tian lernejon kaj dubas pri la fina sukceso de la privata lernejo. Kvankam ni faris multe da penado kaj ankaŭ tempo tiel longe pasis, ni tamen kolektis tiom malmulte da mono. Laŭ mia statistiko, meznombro, el dek familioj, kiujn ni petis finaci nian planon, nur unu familio, tio estas dekonon, volas doni helpon. Tial, mi opinias, ke estas pli bone se ni ĉesu nian laboradon kiel eble plej baldaŭ.”

Tiam la edukisto ekstaris kaj interrompis lin, dirante: “Viaj vortoj ne estas malpravaj, ni ja en efektiveco kapablas akiri monhelpon nur de dekonon de la familioj. Ni do havas grandan esperon, ĉar ni turnas nin al cent familioj kaj certe eblos ke el ili dek subtenas nin.”

“Cetere,” ankoraŭ aldonis la edukisto, “nun oni tre malmulte informiĝas pri nia plano. Se nia laborado plu daŭros kaj kun tempo pli kaj pli da personoj komprenos nin, tiam, ne nur la nombro de kontribuantoj de mono plimultiĝos, sed krom ke ili mem kontribuos, ili ankaŭ povos anstataŭ ni konsili al aliaj doni helpon. Mi pensas, ke tiam por ni ne estos dekonon, kaj kredeble la dekonon de la familioj ŝanĝos sin en cent familiojn, kiuj favoros nin.”

Ĉe la fino de la kunveno, la ĉeestantoj voĉdonis por ambaŭ malsamaj opinioj. Ankaŭ mi estis unu el la ĉeestantoj. Mi donis mian voĉon kontraŭ la edukisto. Mi ne plu volis esti monkolektanto, ĉar venis al mi devizo tre antikva en nia lando. Se temas pri mono, oni nepre ne direktu peton al tiu, kiu nur post persvadiĝo deziras doni sian monan almozon.

✂

Longe ni nenion aŭdis pri la situacio de MU Binghua post la granda tertremo en lia regiono, kaj multaj el ni iomete maltrankviliĝis. Finfine mesaĝo atingis nin ke li vivas sane sed la materiaj difektiĝoj estas sufiĉe grandaj kaj ekonomie pezaj. /Red



En la pasinta numero de Dia Regno ni komencis re-publikigi la serion de artikoletoj verkitaj de la tiama prezidanto Adolf Burkhardt. Kvankam ĝi estis verkata en la situacio de la tiama tempo, multe validas ankoraŭ hodiaŭ. Legu la jenan artikolon kaj trovu la valoraĵojn en ĝi. /red

“Nia laboro ne estas vana en la Sinjoro”

Laborplano de KELI

Adolf BURKHARDT, DE

2) Organize plifirmigi la kondiĉojn por efektiva kresko.

KELI estas la tutaĵo el individuaj membroj, amikoj, simpatiantoj kaj abonantoj, lokaj grupoj, landaj sekcioj kaj ties estraroj kun la internacia estraro. La kapableco por servi en la senco de nia celdifino (sur la dua paĝo de ĉiu numero de DIA REGNO) dependas de la forto, kiun tiu tutaĵo prezentas. Tial, laboro laŭ nia plano estas nepre kunlaboro. Ĉies kontribuo estas grava. Ĉiu trovas iujn eblecojn.

a. *Kreskigi la membraron.*

Kiam via prezidanto aŭ iu alia funkciulo

de KELI komencas intertrakton kun iu instanco aŭ simple diskuton en grupo aŭ kun individuo, preskaŭ neeviteble la unua demando tekstas: Kiom da membroj vi havas? Eĉ se ni tre bone laboros, dum longa tempo nia membro-nombro ne estos impona. Tamen estas diferenco, ĉu oni devas paroli pri pluraj cent aŭ pri pluraj mil. La graveco por la propra ekonomia vivo de la Ligo ne bezonas substrekon. Tial ni ĉiuj kunlaboru por kreskigi la nombron. Unualoke per kreo de novaj esperantistoj. Inteligenta homo bone kapablas mem lerni lingvon – sed

ofte li ne scias, kie akiri lernolibron. Neniu membro estas tro okupita por teni preta tiajn adresojn. Kursoj ne bezonas esti mamutaj – fidela studrondo de kelkaj personoj estas valora kontribuo. Sed ni varbu ankaŭ inter kristanaj esperantistoj, kiuj ĝis nun nenion sciis aŭ ne havis kontakton kun KELI – tamen nepre ne forlogante ilin el ekzemple neŭtrala societo. Krom ebleco estas la membrigo de familianoj – edzino, infanoj – laŭ la minimua kotizo starigita por tiu celo.

b. *Pligrandigi la nombron de fakdelegitoj en UEA.*

Individuaj membroj de UEA, kiuj bone scias la lingvon, povas proponi sin kiel fakdelegito en la respektiva loko. La jarlibro de UEA donas detalajn informojn. Ni sugestas, ke la KELI-anoj, kiuj ankaŭ estas membroj de UEA, esploru la eblecon akcepti tian taskon. Por unuecigi la nomon de tiu delegiteco, en Strandbaden ni konsentis pri la termino “Evangelia Kristanismo”, kvankam ĝi eble estas misgvida por iuj. Ĝi devus kovri tre vastan skalon el ne-katolikaj kristanoj, laŭ la konsisto de la KELI-membraro. (En angla-usona uzo, la vorto “evangelia” estas multe pli strikta; kiuj povas proponi pli trafan terminon?). Fakdelegito, kies nomo regule aperas en la jarlibro de UEA, unua parto, devas esti preta doni informojn al petantoj pri kristanismo aŭ, en kazo de bezono, transdoni tian inform-peton al alia fakulo. Cetere, estas grave por ĉiu esperantisto, ke UEA estu forta kaj labor-kapabla, tial la modelo de tiuj KELI-anoj, kiuj samtempe apartenas individue al UEA kun la gazeto


kaj jarlibro, estas imitinda por ĉiu, kiu finace kapablas.

c. *Plivastigi la reton de landaj reprezentantoj.*

En multaj landoj ni havas nur kelkajn membrojn. El nia adresaro estas facile konstateble, kie ili tute mankas. Tamen vivas kristanaj esperantistoj ankaŭ en iuj el tiaj landoj, sen daŭra kontakto kun ni. Ofte la cirkonstancoj estas pli fortaj ol ni. Sed ni atentu pro ŝanĝiĝoj, kaj tiam tuj ekagu. Kiel reprezentanto povas servi persono, kiu estas preta teni kontakton kun la samlandanoj kaj esti la korespondanta centro. La estraro de KELI invitas proponojn por starigi reprezentantojn en la koncernaj landoj (oni skribu al la sekretario).

d. *Starigi novajn sekciojn respektive plivigliĝi jam ekzistantajn.*

Tio fakte estas tasko de la estraro, kaj en Debrecen ni komisiis al prof. Horsky speciale atenti pri tiu flanko. Kie eble, la KELI-anoj en iu lando fondu landan sekcion de la Ligo. Antaŭ la oficiala starigo de tia sekcio ĝia statuto devas esti aprobita de la Liga estraro. Kie la nombro da KELI-anoj aŭ la cirkonstancoj ne permesas starigon de sekcio, ni agu la c). Interne, la sekcioj aplikas la plej taŭgajn rimedojn konforme al la situacio. Sed ili ĉiam konsciu, ke ili ne estas celo en si mem, sed konsistiga parto de la tutaĵo. Estas rekomendinde, ke la estraroj de la landaj sekcioj, krom la laŭstatuta devo de raportado al la Liga estraro, restu en kontakto ankaŭ kun la aliaj sekcioj, por plejeble profiti de la spertoj de la aliaj kaj komuniki al ili la proprajn. ☞



Raporto pri prepara vizito al Vroclavo, nia kongresurbo 2009

Raportas Pavel Polnický, Ĉeĥio

Estimataj, dimanĉe mi kun IKUE prezidanto Miloš Šváček forveturis al Pollando. Ni haltis en Gliwice, kie okazis E-renkontiĝo kaj ni lunde havis eblecon informi ĉiujn pri ĉi-jaraj kongresoj – M. Š. pri IKUE en Rimini (50 partoprenantoj) kaj mi pri Pribylina (46 pp.) kaj ni invitis ilin partopreni venontjaran kongreson eku-menan en Vroclavo.

Marde ni veturis trajne al Vroclavo kaj tie nin atendis s-ro Bogdan Dambiec, kiu akompanis nin al hotelo kaj vespere venis Tereza Pomorska kaj ni komune partoprenis festan piroteknan lumludon, okaze de pola nacia festo, kiu marde estis.

Merkrede matene ni (Miloš, Tereza, Bogdan, s-ino Nowak, pastro Pawlaczek kaj mi) renkontiĝis en kafejo kaj ni traktis nian ĉi-tagan programon. Ni komencis per vizito de evangelika preĝejo (aŭgsburga) kie akceptis nin episkopo Bogusz kaj ni preparolis nian diservon

dimanĉan. Ni povas komenci je la 9:00 kaj poste tuj partopreni ilian polan diservon je la 10:00 horo. Poste ni vizitis seminarion, kie akceptis nin rektoro kiu persone montris al ni tutan konstruaĵon. Poste ni traktis en urbodomo de Vroclavo kun oficistino de kultura fako pri kongreso kaj ebla kunlaboro kaj helpo de urbo. Poste ni iom manĝis, vizitis klubojn de loka klubo kaj kunvenon de fervojista E-klubo en ĉefa stacidomo kaj poste kontentaj, sed iom lacaj reiris hotelon. Matene ni reveturis hejmen...

Intertempe aliĝis 43 personoj kaj estas espero, ke la kongreso povus esti sukcesa... La urbo kaj speciale la lokigo de la seminario sur la insulo de la rivero Odra tuj apud impona katedralo estas tre belega... Mi estis vere agrable surprizita..


Do, tio estas mia konciza informo pri nia vizito.

Amike salutas ĉiujn
Pavel (kaj same Miloš)

Listo de novaj aliĝintoj ĝis 26.11.2008

037	S-ro	BORKOWSKI Henryk	Pollando
038	S-ro	SOBOL Bogusław	Pollando
039	S-ino	SULIMA Teodozja	Pollando
040	S-ino	ŚWIEJKOWSKA Dorota	Pollando
041	Sac.	PLATEK Stanisław	Pollando
042	S-ino	ZDRZALIK Maria	Pollando
043	S-ino	GRABOWSKA Eugenia	Pollando
044	S-ino	KUSKOWSKA Anna	Pollando
045	S-ino	LUNDKVIST Arne	Svedio
046	S-ro	SÜDLAND Norbert	Germanio

Entute	
Ĉeĥio	4
Francio	2
Germanio	4
Hungario	4
Italio	5
Kroatio	1
Nederlando	2
Pollando	20
Rumanio	1
Svedio	3



Bibliaj Tagoj, 2008 en klostro Nütschau, norda Germanio

Raportas G. DERCKS, B. EICHKORN, A. KRONENBERGER

Pri la psalmoj, centra riĉeco de la Biblio por nia spirita vivo, prelegis de 20. – 24. de oktobro 2008 patro Willibald Kuhnigk OSB en la klostro Nütschau, tie loĝanta esperantisto. Antaŭ 50 jaroj la benediktanoj fondis tiun klostron, hodiaŭ la spirita centro de la refondita arĥi-episkopejo Hamburg. Partoprenis esperantistoj el Germanio, Nederlando kaj Svedio

La preleganto montris al ni, ke la hodiaŭa psalmaro estas komponita kiel unuo, kvankam la unuopaj 150 psalmoj havas tute malsamajn originojn kaj funkciojn. La psalmaro de la Biblio konsistas el kvin libroj, paralele al la kvin libroj de la Torao: La bazo de la preĝado havu la saman strukturon kiel la fundamento de la kredado. Cetere: ankaŭ Mateo konstruis sian evangelion simile ĉirkaŭ kvin grandaj paroladoj.

La psalmaro estas kvazaŭ ĝardeno, kiun oni eniras per Psa 1 kaj 2. Oni promenas ene kun danko kaj laŭdo, kun plendo kaj adoro, kaj oni eliras per Psa 149 kaj 150. La unuopaj “bedoj” en la ĝardeno estas ordigitaj ne hazarde, sed ofte ligitaj inter si laŭ temoj aŭ motivoj.

Kulmino de la tuta psalmaro estas la 90-aj psalmoj, ligitaj inter si per la vortoj: “La Eternulo reĝas”. Ilia ĉefa temo estas do la Dia Regno, kiu estas regno ne de milito, sed de paco, ne nur por Izraelo, sed por ĉiuj popoloj. Dio

donacos sian savon pere de lia sendito, la Mesio. Ni kristanoj vidas tion plenumita en Jesuo, la Kristo.

Patro Willibald klarigis al ni aliajn psalmo-kategoriojn:

La laŭdopsalmoj, ekzemple Psa 33, 135 kaj 136, kutime mencias post la invito la kaŭzon de danko kaj laŭdo: plej ofte la kreitaĵo kaj la savo de Izraelo el Egiptujo.

La plendopsalmoj, ĉu de unuopulo, ĉu de la popolo, preskaŭ ĉiam finiĝas per la glorado de la jam antaŭ-atendita helpo de Dio. Eĉ se mankas tia pozitiva elrigardo en Psa 39 kaj 88, la preĝanto ne restas sen espero: la lumo de aliaj psalmoj konsolas nin, samkiel post la pasiona Psa 22 sekvas Psa 23 pri Dio, la bona paŝtisto. – Kadre de la plendopsalmoj ni ankaŭ forte diskutis la problemon de la malbenoj kontraŭ malamikoj.

La kantoj de suprenirado, Psa 120 – 134, esprimas origine la ĝojon de la pilgrimantoj al la templo de Jerusalemo, sed ili jam tiam, des pli multe hodiaŭ, malfermas la okulojn por la gloro de la ĉiela Jerusalemo. Kaj de Psa 147 iras ponto al



la lastaj ĉapitroj de la Apokalipso.

Tiele patro Willibald prezentis al ni la riĉecon de la psalmoj. Li montris sin spertulo ne nur en la esperanta Biblio, sed ankaŭ en la hebrea originalo, parolante sen manuskripto, parkere sciante la ligojn inter la psalmoj kaj aliaj bibliaj tekstoj komparendaj.

Kelkfoje tage nia preleganto devis ĉesi la parolon pro la fakto, ke li devis kunkanti, preĝi kaj celebri en la benediktana preĝejo kune kun la aliaj monaĥoj. Tiam pastro Albrecht Kronenberger kantigis nin per la libro ADORU kaj per speciala nova kajereto kun “Psalmodoj post Adoru”, ĉefe el la Ĝeneva Psalmaro. Kelkfoje ankaŭ ni partoprenis en la Diservoj de la



Bernhard Eichkorn, Albrecht Kronenberger

benediktana komunumo.

La restado en la monaĥejo tre plaĉis al ni. Nütschau, kvankam rekte apud la aŭtoŝoseo, estas trankvila loko kun puraj gastokambroj. Je nia dispono estis agrabla okangula kunvenejo, de ni ornamita per floroj kaj kandelo. Post mallonga piediro oni atingas la modernan kapelon kaj la vastan manĝosalonon, en kiu ni bonege manĝis. En la ĉirkaŭaĵo estas parko kaj troviĝas lageto, en kiu naĝis anasoj. Ekstere brilis la suno, kaj ni vidis la aŭtunajn kolorojn de la foliaro. Unu tagon patro Willibald gvidis nin tra la malnova kaj nova klostro-partoj, en kiuj la monaĥoj vivas multe pli mallukse ol iliaj gastoj.

– Estas menciinde, ke oni ankaŭ unuope povas esti gasto en Nütschau por kelkaj tagoj aŭ semajnoj:

Adreso:

Frato Willibald Kuhnigk,
Schlossstraße 26,
23843 Travenbrück,
Tel. 04531 5004-151 (Sekretariat -100).
Rete: <http://www.kloster-nuetschau.de/>



La apostolo Paŭlo en Turkio

Siegfried KRÜGER, DE

Mi legis mallongan raporton pri Turka Bibliosocieto, kiu vere ekzistas en Istanbul. La kristanoj en Turkio estas minoritato de nur 1% el ĉiuj turkoj. Tamen ĉiujare estas venditaj pli ol 20 000 biblioj. La artikolo memorigas, ke la kristanismo grandparte estiĝis sur la grundo de la hodiaŭa Turkio. Do la Biblio ne estas okcidenta importo por la turka kulturo, sed esence ĝi estas eksporto el Turkio.

La Paŭlo-jaro memorigas al la naskiĝo de la apostolo Paŭlo antaŭ 2000 jaroj en la turka urbo Tarsus kaj al la misiaj vojaĝoj en la lando. Ni legas pri tio en la Agoj de la Apostoloj. “*En Antioĥia la disĉiploj unufoje nomiĝis Kristanoj*” (Ago 11,26). ☩

Informaĵoj

Ni ĉerpas la jenan informon el Dio Benu:

En antaŭfesta vespero de ŝtata festotago, 90-a datreveno de memstareco de la respubliko, honorigis la 27-an de oktobro ĉefurbestro de urbo Pĕřerov Inĝ. Jiří Lajtoch per medalo de Johano Amos Komenio kvin meritindajn personojn, inter kiuj estis ankaŭ prezidanto de IKUE kaj de la Ĉeĥa IKUE-Sekcio s-ro Miloslav Šv́aĉek. Proponon



por tiu ĉi honorigo donis Komitato de E-Klubo en Pĕřerov, al kiu s-ro Šv́aĉek kore dankas. Tiun estimigon li ne komprenas nur kiel aprezon de propra longjara E-aktivo, sed ankaŭ de tiu de liaj kunaktivantoj. ☞




Dum la kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio ricevis Honoran membrecon inter aliaj ankaŭ Petr Chrdle, (maldekstre) membro de KELI-sekcio kaj Pavel Polnick́y (dekstre) nia sekretario de KELI. ☞

Ni gratulas al la honorigitoj!



MI VOLAS



Sándor REMÉNYIK (1890–1941)

Elhungarigis 'Sigmond Júlia, RO

Mi volas ne esti grava por mi mem.

En la senfina mur' mi estu briko,
Ŝtuparo, kiun aliul' alsupru,
Plugilfero funde fosanta teron,
Sed spiko ne estas ĝia merito.
Mi estu vento disportanta semojn,
Sed petalojn neniam ĝi malfermas,
Kaj homoj sur kampo promenante
Prenu plezuron el la belaj floroj.
Mi estu tuko, kiu larmojn viŝas,
Estu silento ĉiam trankviliga,
Mano mi estu ĉiam karesanta,
Mi estu, sen scii pri mia ekzisto.
Mi estu sonĝo sur cilioj lacaj,
Fatamorgano, kiu ne demandas
Ĉu oni ĝin atentis aŭ ignoras,
Fatamorgano sur la ebenaĵoj.
Ĝemo profunda el la nigra koro
Ekde olda terglob' ĝis alta ĉiel',
Estu mi drato portanta mesaĝon,
Kaj oni sanĝu min se mi rompiĝas.
Estu mi floso sub multaj animoj,
Simpla boato krude konstruita,
Kiun portas maren grandaj riveroj.

Violon' mi estu al etern' ploranta,
Ĝis la artisto ne demetas l'arĉon.